daŭ denove eldoniĝis sole "*Das Tier*", por kies eldono Gĵimek' tre intense, Silman' nur tre senzorge sin engaĝigis.

Dum la ĉiumonataj redakci-kunvenoj ĉiam ĉeestis prof. Gĵimek'; afereme kaj fake preparita li batalis leonece por la redaktado, precipe por siaj speciale gravaj enhavopunktoj. Tiuj renkontiĝoj, al kiuj komence partoprenis ankaŭ Silmano, estas neforgeseblaj. Ambaŭ sciencistoj ja ĝuis en la publiko la statuson de "eminentuloj" kun la famo de televid-steloj, kies samĉambra renkontiĝo naskas pikpikan atmosferon. Gĵimeko sciis kiel reprezenti sian pozicion kun emfazo kaj sukceso, kaj tuj evidentiĝis, ke li ĉiujn siajn intencojn tre zorge, longtempe kaj senkompromise planis kaj ili, spite al kontraŭeco, preskaŭ ĉiam akiris ĝeneralan akcepton. La iom cedema *Sielmann* havis neniom por obĵeti aŭ kontraŭdiri, kaj baldaŭ forlasis la interkonsiliejon.

Nun mi ofte kaj regule havis la okazon, persone renkontiĝi kun la fama aktivisto por natur- kaj bestprotektado, kun longdaŭraj postkonferencaj interparoladoj – ofte ĝis ne plu funkciis publikaj transportiloj. Ĉiu persona "nealirebleco" malaperis de Gĵimek' kaj cedis spacon por stimulaj kaj instigaj pensoj. Li estis homo forte gvidata de sia prudento – oni certe ne povis atendi sentimentalulon aŭ multemocian homon. Sed oni povis paroli kun li kaj komuniki sen ĉiam konscii pri liaj meritoj kaj publika signifo. Li estis granda homo, kiu firme staris sur sia fundamento kaj radiis kapablecon sen bezono de glora aŭreolo.

Tuŝis min persone kaj gaje, kaj estis granda honoro por mi, ke post la subita morto de Gĵimek' en 1987 la redakcio kaj eldonejo petis min transpreni la oficon kiel eldonanto kaj daŭrigi la aperadon de la periodaĵo laŭ Gĵimeka intenco. Tuŝis min rememore al *Bernhard Grzimek* tre malgajige, ke la ĵurnalo "*Das Tier*" 13 jarojn post lia morto ĉesigis la eldonon pro malamika konkurenca transpreno de alia eldonejo.

**Adreso de la aŭtoro**
*Prof. Dr. Harald* SCHLIEMANN
*Ünner'n Diek* 2
DE – 25724 – *N e u f e l d* (*Krs. Dithmarschen*)
GERMANIO

**Priaŭtora informo**

Profesoro pri zoologio ĉe Zoologia Instituto kaj Muzeo de la Universitato Hamburgo, Germanio.



# *Bernhard Grzimek* – naturprotekta antaŭpensulo kaj obstinulo

*Rüdiger* SACHS

Zoologo kaj veterinaro, zoodirektoro kaj naturprotektanto, libroaŭtoro kaj bestofilmisto, televidstelo kaj mon-donac-kolektanto: la 24-an de aprilo 2009 profesoro d-ro *Bernhard Grzimek* (Gĵimeko) fariĝus cent jarojn. Kiel preskaŭ neniu alia li akcentis, ekde la 1950-aj jaroj, la temon "Bestoj kaj Naturo" – ne nur en Germanujo. Ankaŭ se lia nomo pleje estas konata pro la libro kaj filmo "Serengetio nepre ne mortu" kaj siaj 30-jardaŭraj televid-elsendaĵoj "Spaco por bestoj", li estis multe pli ol "la televida bestoprofesoro". Gĵimeko esence pre-



**Bildo 1**: *Bernhard Grzimek* serĉas en la veterinara esplorejo *Kirawira* (vd. la mapon en paĝo 219) taŭgan foto-objekton por sia gazeto "La Besto" ("*Das Tier*") (Foto: *R. Sachs*)

gis, kune kun aliuloj, la institucian naturprotektadon kaj estis antaŭpensa kaj kunfonda por multaj organizaĵoj kaj sciencaj institutoj. Li antaŭenpuŝis la fondiĝon de la unua germana Nacia Parko en Bavara Arbaro kaj estis la unua oficiale instalita komisiito de la germana registaro pri naturprotektaj aferoj.

Komence de la 1950-aj jaroj, kiam Germanujo troviĝis en tre malfacila postmilita rekonstruo, Gĵimeko ekiris Afrikon. Dum la unua vojaĝo 1951 li celis Eburan Bordon. Kiel direktoro de la "Frankfurta Zoo" li volis restoki la animalaron de la en la dua mondomilito detrue damaĝita bestoĝardeno. Kaj li samtempe volis studi kaj filmi la vivon kaj kondut-manierojn de la sovaĝeje vivantaj bestoj por plibonigi la tenadon kaj prizorgadon de sovaĝbestoj sub zooĝardenaj cirkonstancoj.

La situacio de la sovaĝbestoj sur la afrika kontinento teruris lin. Jam tiam, antaŭ pli ol 50 jaroj, li antaŭvidis tion, kio fariĝas hodiaŭ tutmonda problemo: la daŭre kreskanta nombro de la homaro postulas ĉiam pli kaj pli da spaco kaj naturaj resursoj – kaj la sovaĝejaj areoj ŝrumpas rapidege: la "Spaco por bestoj" fariĝas ĉiam pli kaj pli malgranda. El tiaj vojaĝoj kaj surlokaj spertoj rezultis en tempodaŭro de malmultaj jaroj profunda engaĝiĝo por la bestomondo de Afriko. Bernardo kaj lia filo Miĥaelo Gĵimek' kreis per siaj elaeroplanaj observadoj kaj bestokalkuladoj la bazon por la hodiaŭaj mondovastaj naturprotektadprogramoj de la Frankfurta Zoologia Societo, kies prezidanto Bernardo Gĵimeko estis ĝis sia morto en la jaro 1987.

La patro kaj filo Gĵimek' estis eksterordinara duopo, kiun interligis same eksterordinara patro/filo-amika interrilato de unu al la alia. Per la komunaj libro kaj filmo "Serengetio nepre ne mortu" ili lanĉis tutmondan sukceson. En la usona Holivudo la filmo – kiel unua germana dokumentada filmo post la dua mondomilito – gajnis la valoran *Oscar*-premion. Por la filo Miĥaelo la sorto ne volis, ke li ĝisvivu tiun grandegan honoron: en januaro 1959, antaŭ la filmscenara fino en Serengetio, li perdis sian vivon post kolizio de sia zebrostriita flugmaŝino kun vulturo.



**Bildo 2**: La tombo-piramido por Miĥaelo Gĵimek' rande de la Ngorongoro-kratero. Engravurita en la ŝtono estas: "Li donis ĉion, kion li posedis, eĉ sian vivon, por protekti la sovaĝajn bestojn de Afriko".



La patron Bernardo Gĵimek' tamen ne senkuraĝigis tiu kortuŝa sortobato. Kontraŭe, lia engaĝiĝo por la Afrika bestomondo plialtiĝis, certe tutasence laŭ sia morta filo, kaj rezultigis la ekeston de "*Michael-Grzimek*-Memoriga Laboratorio" en la jaro 1962.

Kiam Bernardo kaj Miĥaelo Gĵimek' alvenis Serengetion, oni tiam ĵus volis malgrandigi la limojn de la Naturparko. La gĵimekaj helpokrioj pere de la libro (tradukita en 52 lingvojn) kaj oskar-premiita filmo estis fruktoportaj, kaj Serengetio fariĝis dum la postaj jardekoj unu el la plej bone projektitaj Naciaj Parkoj mondovastaj. Sed ankaŭ en tiom unika sovaĝej-konservejo la tempo ne haltas kaj la sekvoj, efikoj kaj konsekvencoj de nia moderna mondo estas videble kaj senseble rimarkeblaj.

Hodiaŭ Serengetio – kaj kun ĝi la ĝenerala naturprotektado – staras antaŭ tute novaj provokoj. La vojaĝo tra tiu unika orientafrika nacia parko ja ankaŭ hodiaŭ estas naturtravive ekscita. Sed la nombro da turistoj pli kaj pli kreskas, kaj kun tio ankaŭ certaj problemoj. La konservejo troviĝas antaŭ du alternativoj, kvazaŭ al grava vojkruciĝo por la estonto: 1. ĉu pluevolui [laŭ la Masajamara areo] kun amasturismo kaj malaltiĝantaj bestopopulacioj, aŭ 2. resti ekskluziva regiono, kiu garantias veran sovaĝejan travivaĵon. En ambaŭ okazoj necesas, kune kun la naciaparka administraro, pripensi naturakordiĝemajn, naturpacemajn kaj naturkonsentemajn strategiojn por la proksima kaj malproksima estonto.

Furioze kreskas la nombro de la loĝantoj ĉirkaŭ la Parko (vd. la tiuĉikajeran scienceĥaĵon: "Pri la malapero de sovaĝbestoj en safariparko", p. 250). La premo sur la park-limoj forte kaj daŭre plialtiĝas, ĉiam pli ofte malsanoj de hejmaj bestoj estas transigataj al sovaĝbestoj kaj inverse. Per integraj programoj la parkaŭtoritatoj, kune kun la respondeculoj en la vilaĝoj, devas serĉi solvojn kiuj ne nur servos la naturprotektadon sed ankaŭ kontentigos la postulojn kaj dezirojn de la tie vivantaj homoj por plua ekonomia evoluo.

Ĉu eblos interligi la indiĝenajn najbarajn popolgrupojn kun la diversaj turistoprojektoj kaj kun la necesa naturprotektado? Nur tiu, kiu perceptas kaj plene komprenas la valoron de loka sovaĝfaŭno ankaŭ pretas protekti ĝin. La marŝorda migrado de tiom granda amaso da gnuoj kaj zebroj faras la neafrikan rigardanton pie devota – sed la indiĝena farmisto meditas pri la antagonismo inter (por lia viv-necesaj) hejmaj kaj (laŭ li sole spacon kaj furaĝon forprenantaj) sovaĝaj bestoj.



**Bildo 3**: La blanka kilimanĝara neĝokapo el la jaro 1959
(el: "Ne plu neĝo sur Kilimanĝaro", *Scienca Revuo*, Vol.53 (2002)(2), p.109)

Unu el la plej gravaj demandosignoj por la estonto de Serengetio estas la mondovasta klimata ŝanĝiĝo. La iame blankan neĝokapon de Kilimanĝaro, la plej alta monto en Orienta Afriko (Bildo 3), hodiaŭ anstataŭas malpurgriza senneĝa montosupro (Bildo 4). Antaŭsignoj supozigas, ke la distribuo de la pluvokvantoj same aliiĝos. La giganta spektaklo de la migrado de 1,3 milionoj da gnuoj kaj aliaj sovaĝbestoj ja dependas ekzakte de tiuj nunaj pluvoverŝoj.



**Bildo 4**: Ne plu neĝo sur Kilimanĝaro
(Fotaĵo de Kilimanĝaro el *Olympus*-kalendaro por la jaro 2009)

Kiom signifa prof. Gĵimek' estis por mia vivo, mi nur nun ekkonis. Ekzistas ja multaj memoroj. Sed ne la televidaj elsendaĵoj (ĉar tiam mi laboris en Afriko, kie ne videblis germanujaj televidprogramoj). Laŭ mia scio ne ekzistas alia elstara naturprotektanto, kiu povas prezenti kompareblan dumvivan laborkvanton kaj efikecon. Gĵimeko ja



estis 18 jarojn pli aĝa ol mi. Kiam ni renkontiĝis la unuan fojon, li faris al mi la impreson esti tre serioza kaj digne lanta, jes, preskaŭ daŭre iom enpensiĝinta, meditema, malrapide parolanta. El la hodiaŭa vidpunkto estas klare: sen li ne plu ekzistus la Frankfurta Zoo, la Serengetia Nacia Parko ne iĝus la nuna naturkonforma bestorezervejo kaj la internacia naturprotektado neniam estus ricevinta tiom altan atenton. *Bernhard Grzimek* estis grandioza viziulo. Tio por ĉiam restas mia memoro pri la "televid-onklo" kaj mondonac-varbanta bestoprotektpropagandisto, kiu per sia afabla obstineco kolektis milionojn por la konservado de la naturo kaj alportis la afrikan faŭnon per sia televid-elsendaĵoj en preskaŭ ĉiujn germanajn loĝoĉambrojn.

Sed tamen la granda – kaj alta: 1.92 m, kaj grandmerita: pluraj honordoktoraj kaj honorprofesoraj titoloj – Bernardo Ĝĵimek' ne estis tute libera de certa ĉas-entuziasmo – sed cele al tute aliaspeca predo. La svelte vireca viro, tre alloga por virinoj, posedis nekompareblan febran agadon por monokolektado. Ĉiu pribesta televidelsendaĵo finiĝis donacopete. Kaj ŝajnas tute vera la historio pri lia renkontiĝo kun usona riĉulino en iu safariparka restoracio, kiam li persvadis ŝin donaci. Kiam li vidis la ĉekon laŭsume de mil dolaroj, li ĝentlemane demandis: "Ĉu via sinjorina moŝto eble forgesis nulon?" Kaj ŝi metis la nulon malantaŭ la lastan ciferon. Oni ja vere devas havi specialan ĉas-talenton por iu tia multprocentiga plialtiĝo de mona donaco por la sovaĝa bestomondo…

Neniu forgesas la fotaĵojn, kiel la zoo-direktoro dum sia preskaŭ 30 jarojn dissenditaj dokumentada serio "Spaco por bestoj" alportis antaŭ la kameraon gepardojn, simiojn kaj aliajn grandajn aŭ malgrandajn, konatajn aŭ nekontajn animalospeciojn el sia Frankfurta Zoologia ĝardeno (vd. la Bildojn en p. 191 kaj p. 201). La elsendaĵoj atingis enŝaltkvotojn ĝis 70-procentajn. Ili estis "interfamilia evento" por multaj germanoj kaj pregis la naturkomprenon de tuta generacio.

Gĵimek' estis homo diverslinie pensanta, ne ĉiam malkomplika kunvojulo, tamen homo pretiganta la vojon al novaj ideoj, pioniro en la kampo de natur- kaj bestoprotektado. Li jam tiam parolis pri temoj, pri kiuj ni – la tiam por li en Serengetio esplorantaj junaj sciencistoj – eĉ tute ne sonĝis kaj kiuj hodiaŭ estas ekstreme aktualaj. Lia plej granda sukceso estis: stimuli kaj akceli la fieron de la afrikanoj pri siaj landoj. Li montris al ili, kian trezoron ili havas en la loka sovaĝbestaro, kaj ke ili ĝin devas gardi kaj protekti. Li plue sukcesis, per la kolektita mono kaj helpe de la tiama prezidento de Tanzanio

per la kolektita mono kaj helpe de la tiama prezidento de Tanzanio d-ro *Julius Nyerere* ŝanĝi la naciparkajn limojn tiel, ke la sovaĝbestoj povas migradi laŭ siaj heredaj vojoj, kiuj ĝis hodiaŭ havas la saman praan formon kiel en antikvecaj epokoj. Tamen, mi denove devas atentigi, ke tiom nedifektite kiom tiu ĉi sovaĝeja bestomondo aspektas, ĝi tute ne estas. La turismo – iama beno – fariĝis malbeno. Ĉiun jaron proksimume 120 000 turistoj vizitas Serengetion. Sed veran vizitan "sovaĝejan travivaĵon" dum la nuna amasturismo la turistoj mem detruas. Kiam la *Michael-Grzimek*-Memorlaboratorio iĝis en la komenca fazo, la Parko troviĝis – pro la tre malbona ekonomia situacio de Tanzanio – en ĥaosa kondiĉo. Ŝtelĉasado estis sur la tagordo (vd. bildojn en p. 225 kaj p, 226), la parkgardistoj preskaŭ ne deĵoris, dum jaroj ekskluzive nur gravis protekti la parklimojn (kiuj ja konsistas nek el dratreta barilo, nek el ŝtona muro, nek el profunda foso) kontraŭ senpermesa eniro.

Hodiaŭtempe ne plu sufiĉas por tiuspeca Nacia Parko iu klasika, tamen eksmoda naturprotektado. La granda vizitantonombro, la mondovasta klimatoŝanĝiĝo, la malsanoj transigeblaj de hejmaj al sovaĝaj bestoj estas la plej gravaj problemoj. Sed speciale pezas la kreskanta indiĝenloĝantara premo, ĉar la farmoj kaj kultivejoj de la leĝaj kaj neleĝaj homoj sufoke ĉirkaŭkroĉas la Parkon (vd. la scienceĥaĵon "Pri la malapero de sovaĝbestoj en safariparko" en p. 250).

La malkontento pli kaj pli altiĝas, kiam leonoj mortigas laktodonajn bovinojn kaj elefantoj detruas maiz-kampojn kaj formanĝas fruktrikoltojn bezonatajn por vivteni la propran familion. Per kelkaj portretoj kaj mallongaj temoj mi volas doni enrigardon en la mondon de la Gĵimekaj heredantoj kaj veki la intereson de la SR-legantoj pri la sensostreĉaj kaj ekscitaj historioj, malantaŭ kiuj kuŝas ofte la vorto "naturprotektado", ĉar Serengetio nuntempe estas antaŭ novaj provokoj: turismo, bestomalsanoj, hejmbestaj/sovaĝbestaj konfliktoj, populaci-premo, klimatoŝanĝo.

**Adreso de la aŭtoro**
*Prof. Dr. Rüdiger SACHS*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 – Eschwege* / Germanio
<isaesachs@aol.com>

**Priaŭtora informo**
Doktoro de veterinarmedicino. Profesoro pri parazitologio. Iama scienca kunlaboranto de prof. *Grzimek*.



# Kiom ofte vi pasintjare vizitis koncerton?

*Wolfdietrich KÜHME*

En 1962 mi sidis kun mia edzino en la ĉefa buroo de la Zoologia Ĝardeno en Frankfurto antaŭ prof. *Bernhard Grzimek* kaj s-ro *John Owen,* direktoro de la Tanzaniaj Naciaj Parkoj. La eminentuloj petis klarigon, laŭ kiuj cirkonstancoj mi pretus iri al Orientafriko por fari "esploron pri leonoj". La spertuloj kredis, ke troviĝas en Serengetio aŭ tro multaj aŭ tro malmultaj de la speco "reĝo de la bestoj".

Ĉu la aludo al koncert-ofteco estis foskaptilo, insida demando? Ĉu tiel eltrovi, ĉu kandidato kapablas malligi sin de karaj civilizaciaj kutimoj, ĉu li taŭgas por riska engaĝiĝo en sovaĝeja soleco? Nu, esti metata kun la edzino kaj bebo kelkajn jarojn en "centron de nenio" estas vere troa postulo. Kion fari se iu malsaniĝos? Tiu demando ne estas signo de malkuraĝo. Serengetio ja surfacas 14 763 km$^2$ (t.e. preskaŭ la duono de Belgujo kun 30 513 km$^2$), kaj la Nacia Parko mem estas protekte ĉirkaŭata de aliaj kontrol- kaj konservadaj areoj (Bildo 1), en kiuj ne loĝas eŭropaj setluloj. La turisma centro de Serengetio, *Seronera*, estas 317 km for de *Arusha*, kie troviĝas la naciaparka administrejo. La plej proksima hospitalo do tiom multkilometre distancas, ke eĉ malgrava malsano kiel apendicito iĝus mortiga. Samdistance ankaŭ la lernejo, la vendejo por aĉeti "ĉiutagajn" mastrumaĵojn, la plej proksima "civilizacia" kafejo…

De tempo al tempo prof. Gĵimek' donis telefonan vivosignon: "Kio pri la antaŭpreparo"? Mi ankoraŭ ne estis vere enveninta en la rondon ĉirkaŭ Gĵimek', kaj nur vidis lin la unuan fojon dum la pridunga interparolo. Miaj kolegoj ĉe Maksplank-Instituto por Etologia Fiziologio en la bavara *Seewiesen* eĉ malpli konis lin. "Zoodirektoro ne estas kutimaĵo en nia esplorinstituto kaj same ne labori en zoologia ĝardeno", grumblis prof. *Konrad Lorenz*, nia fama direktoro. Tute nescienca estis la dua renkontiĝo kun Gĵimek'. Li iam estis malferminta la pordon de mia laboratorio kaj aldoninta al miaj zorge flegitaj buŝkovaj "batalfiŝoj" iujn fremdajn akvovivaĵojn kunprenitajn el okcidenta Afriko. Hororo, kiom rapide povas finiĝi esplorprojekto!